



## **“NENIU ŜTATO AGNOSKAS IAM AJN, KE ĜI HAVAS POLITIKAJN PRIZONULOJN”.**

### **Hamza Yalcin. Ĵurnalisto.**

**Sekvante denuncon de la turka registaro Hispanio arestis en aŭgusto(\*) la kurdan ĵurnaliston Hamza Yalcin. Li timis ekstradicion, sed li ĝojas, ĉar la popola movado tion malebligis.**

Tiun ĉi someron la kurda ĵurnalisto Hamza Yalcin (Golwêran<sup>(1)</sup>, 1959) pasis 56 tagojn enkarcerigita. Aŭguste oni arestis lin en la barcelona flughaveno sekvante denuncon de la turka registaro antaŭ Interpol, fine de septembro oni liberigis lin. Pro tio, ke li verkis en la revuo *Odak*. Turkio akuzas lin fari “terorisman propagandon” kaj lin ekstradicii petis al Hispanio, sed ne okazis tiel, kaj nun li daŭre laboras en la gazeto. Ekde 1985 li vivas en Svedio, de kiam li petis politikan azilon. Pasintan semajnon(\*) li estis en Bilbo en la festivalo *Zentsura At!*<sup>(2)</sup>.

**En la festivalo vi parolis pri la esprimlibereco kaj la cenzuro en la amaskomunikiloj. Pri tio vi iom scias, ĉu ne?**

Jes, kaj nun iom pli. En Turkio la situacio estas ege malfacila, sed en multaj landoj de Eŭropo ankaŭ ekzistas granda cenzuro. Mi laboras en la Universitato de Halmstado<sup>(3)</sup>, kaj tie mi faris esplorkonon pri la sociaj movadoj de Svedio. Inter la klonkludoj mi rimarkis, ke la svedaj sociaj movadoj estas malfortigitaj, sed la universitato ne publikigis tiun esploron. Oni diris, ke oni pristudos la aferon, sed ĝis nun nenio. Tio estas ankaŭ speco de cenzuro.

**En aŭgusto la hispana polico arestis vin, ĉar vi skribas en revuo. Kion vi opinias pri tio?**

Neniu ŝtato agnoskas iam ajn, ke ĝi havas politikajn prizonulojn. Rigardu nun al Hispanio: estas politikaj malliberuloj, sed la registaro diras, ke ili estas teroristoj, ĉar tiu difino taŭgas por iu ajn. Kaj en Turkio, por multaj, mi ankaŭ estas tia, se oni min arestis en eŭropa lando estas por io. Sed ni laboras por la libereco kaj kontraŭ la diktaturo.

**Rilate vian aferon Hispanio kaj Turkio intime kunlaboris. Kiel aspektas tio al vi?**

Mi vidas, ke estas akordo inter ili. Ili kundividigas sian vidponton pri Mezoriento, kaj ambaŭ havas internan problemon rilate iliajn naciojn sen ŝtato. Turkio kun la kurdoj, kaj Hispanio kun katalunoj, eŭskoj kaj galegoj. Je tiuj aferoj ili kuniĝas kaj ili malamikas la pacajn vojojn; tial, ili estas subpremantoj.

**Vi plendis pro la maniero laŭ kiu oni traktis vin en la karcero post la aresto fare de la hispana polico ...**

Jes. Du fojojn mi estis malliberigito en turka karcero, kaj tie la polico, post torturi onin,

traktis tiun digne, almenaŭ. En Hispanio mi ne vidis ion tian; la Polico malŝate traktis min ekde la unua tago. Kiam mia kazo estiĝis mediata la situacio ŝanĝiĝis; tiam ja oni bone traktis min.

**Fine, Hispanio ne ekstradiciis vin. Ĉu vi timis, ke tio okazos?**

Jes, mi timis, ke oni min ekstradicios al Turkio. Hispanio povus tion fari, ĉar ambaŭ ŝtatoj havas similajn ideojn. Oni devas vidi nur, kion oni faris kun la katalunaj aŭtoritatuloj. Tamen, oni ne povas kompari Turkion kun Hispanio, ĉar la registaro de Erdogan estas pli fia. En mia kazo, estas danke al la popolaj movadoj, ke oni ne ekstradiciis min; grandan laboron ili faris.

**Kia estas la stato en Turkio? En 2013 okazis la protestoj en la Gezi-parko, sed poste estis la puĉo kaj la sekvanta subpremado ...**

Oni okupis la Gezi-parkon kaj milionoj da personoj surstratiĝis tra la tuta lando kontraŭ la polica perforto. Granda potencialo estus, se laikuloj, komunistoj kaj kurdoj unuiĝus. Estus grava oportuno por faligi la diktaturon. Erdogan kaptis ĉiuj povojn: religian, ekonomian, armean kaj polican; sed se oni sukcesus fari tiun unuecon mi opinias, ke oni povus ion atingi.

# ZENTSURARA AT!<sup>11</sup>

XI. ZENTSURAREN AURKAKO JAIALDIA / XI. FESTIVAL CONTRA LA CENSURA / XI. FESTIVAL AGAINST CENSORSHIP

ALI FERZAT



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

- (1) Gölören, en la turka.
- (2) Cenzuron for!, en la eŭska.
- (3) Halmstad, en la sveda.

**KLARIGOJ:**

Aŭtoro: Lander Muñagorri Garmendia.

(\*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 14-an de Novembro 2017-a.

Tradukis: NXC. Januaro 2018-a. Provlegis: DS.